

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LIBERON POR
ANTONOV



ANTAŬ NOVA
LERNOJARO



PLENKUNSIDO
DE BEJ



TURISMO KAJ
ESPERANTO



ĤIROŜIMA
MIAMEMORE



LA ALIAJ
PRI NI




LINGVAJ
DEMANDOJ



NIAJ E-
VETERANOJ



ENLANDA
MOVADO



JARO 54 • N-RO 8 • AŬGUSTO • 85

LA „BULGARA SPURO“ — ĈU POLITIKA ĈANTAĜO?

Jam kelkajn semajnojn daŭras la proceso en Romo kontraŭ la bulgaraj civitanoj Sergej Antonov, Jelju Vasilev kaj Todor Ajvazov. Sergej Antonov, reprezentanto de la Bulgara Civila Aviado „Balkan“ en Romo, laŭ la ordono de la enketjuĝisto Martella, estis arestita la 24-an de novembro 1982 pro kulpigo pri komplico, kune kun Todor Ajvazov, la turkoj Musa Serdar Celebi, Bekir Celenk, Oral Celik kaj aliaj neidentigitaj personoj, en organizita kune kun Mehmet Ali Agca atenco kontraŭ la vivo de papo Johano-Paŭlo la Dua. La atenco okazis la 13-an de majo 1981 kaj pro ĝi Agca estis kondamnita al dumviva malliberigo laŭ la itala puna kodo.

La akuzoj kontraŭ Antonov, Vasilev kaj Ajvazov estis bazitaj sur la depozicioj de Agca kiel sola atestanto kaj sur certaj indikadoj. La ordono pri la aresto estis atakita fare de la advokatoj de Antonov, kiuj postulis lian liberigon. Tamen la tiel nomata Tribunal de la Libereco refutis la peton per sia decido de la 3-a de decembro 1982. Per petskribo de la 3-a de januaro 1983 adresita al la enketjuĝisto, la advokatoj de Antonov postulis novajn pruvojn kaj la liberigon de sia kliento.

La peto estis refutita la 22-an de januaro 1983 fare de la enketjuĝisto. Kontraŭ la refuto de la peto la advokatoj de Antonov apelaĉis al la Tribunal de la Libereco pro la sekvantaj motivoj:

1. La pruvoj kontraŭ Sergej Antonov (pri compliceo en la atenco kontraŭ papo Johano-Paŭlo la Dua kaj pri komploto kune kun Ajvazov kaj aliaj individuoj) estis refutitaj pro la fakto, ke neniu el la atestantoj kaj el la kunkomplotintoj konfirmis la eldirojn de Agca kaj kontraŭe, ili estis demaskitaj.

2. La juĝesplorado disponas pri neniu materiala pruvo pri la partopreno de Sergej Antonov en la atenco kontraŭ la Papo.

La juĝesplorado kolektis neniujn pruvojn, ke la atenco kontraŭ la Papo estas rezulto de komploto de la organizaĵo „Grizaj lupoj“, de la kontrabandisto kaj mafiano Bekir Celenk kaj de la „aktivado“ de la bulgaroj oficantaj en Romo.

Malgraŭ tiuj kaj aliaj agoj fare de la advokatoj de Sergej Antonov kaj ankaŭ fare de la bulgaraj aŭtoritatoj, la kazo de Sergej Antonov estis transdonita al la Roma tribunalo kaj la 27-an de majo 1985 la proceso komenciĝis. La anticipa malliberigo de Antonov daŭris pli longe ol tion permesas la itala leĝo.

Tuj post la aresto de Sergej Antonov la mal-

amikoj de la socialismaj ŝtatoj komencis senbridan kampanjon kontraŭ Sovetunio kaj Bulgario. Eĉ supraĵa analizo de la kronologio de tiu ĉi kampanjo de la okcidentaj amaskomunikiloj montras, ke ĝi starigas al si du celojn: unuflanke, akriĝi la juĝesploradon per informoj, gvidante la depoziciojn de la ĉefa atestanto Mehmet Ali Agca kaj, aliflanke, manipuli la publikan opinion en momento, kiu koincidas kun la entreprenado de gravaj politikaj agoj fare de l'adeptoj de la „malvarma milito“ en Usono kaj en kelkaj okcidentaj landoj. Multaj faktoj pravas, ke la tiel nomata „afero Antonov“ estas elfabrikita en la Okcidento kun la senpera partopreno de la imperiismaj specialaj servoj kaj unualoke de la Centra Skolta Agentejo (CIA).¹

Post la komenciĝo de la proceso en preskaŭ ĉiuj socialismaj landoj estis kreitaj komisionoj kaj komitatoj defende al Sergej Antonov. Tiaj komitatoj estis kreitaj ankaŭ en pluraj kapitalismaj landoj. La Internacia Komisiono por Esploro kaj Informado pri la „afero Antonov“ (establitita surbaze de rezolucio, akceptita de la Generala Asembleo de la Internacia Asocio de Juristoj-Demokratoj la 18-an de oktobro 1984) publikigis 30-paĝan raporton.

La Komisiono deklaras, ke post la studado de diversaj publikaĵoj, kiuj subtenas la tezon pri la „bulgara spuro“, ĝi ne povas ekskludi la eblecon, ke ekzistis kampanjo por impliko de Bulgario en la atenco kontraŭ la papo. Tie ĉi la Komisiono estas tre singarda. Sed ĝi korekte konkludas, ke lige kun la proceso kontraŭ Antonov tuta nacio estas jam juĝata, ke se Antonov estas senkulpa, la malutilo jam estas farita ne nur al Antonov, sed ankaŭ al Bulgario, al la socialismaj ŝtatoj kaj fine al la serenigo kaj al la afero de la paco.

En nia lando estis eldonitaj en fremdaj lingvoj (Sofia Press) la broŝuro de Alfred Krispin „La manipulita atestanto“, kolekto de artikoloj sub titolo „La juristoj-demokratoj kontraŭ la arbitraj agoj rilate al Antonov (dokumentoj de la XII-a kongreso de la Asocio de la Juristoj-Demokratoj, okazinta en Ateno la 15-an — 19-an de oktobro 1984).

La amasa movado por solidareco kun Antonov kaj kun la ceteraj niaj samlandanoj,

(sekvas sur p. 6)

¹CIA — Central Intelligence Agency



NIN ATENDAS LA NOVA LERNOJARO!...

En la lastaj 3—4 jaroj la Bulgara Esperantista Asocio notis grandajn sukcesojn en la instrulaboro. Sendube, unualoke en tiu rilato staras la enkonduko de dujara fakultativa lernado de Esperanto en la mezajn lernejojn fare de la Ministerio de Popola Klerigo. Laŭ sia signifo tio estas unu el la plej grandaj atingoj de BEA ekde ĝia fondiĝo ĝis hodiaŭ. Kiom ŝanĝiĝis la situacio post tiu paŝo oni povas konstati per plej simpla komparo: en 1980 t.e. en la jaro antaŭ ĝia enkonduko en la bulgarajn lernejojn, Esperanto estis instruata precipe en rondetoj el ĉirkaŭ 1600—1700 ĝelernantoj en malpli ol 90 lernogrupoj, dum en 1984—85 lernojaro la nombro de la E-lernantoj kreskis al pli ol 3500 en 210 fakultativaj E-klasoj. Al tio oni devas aldoni ankoraŭ unu notindan sukceson: komence de la pasinta lernojaro la Ministerio enkondukis eksperimente trijaran devigan lernadon de Esperanto en la 9 klaso de VIII Unueca Meza Politeknika Lernejo en Sofio.

Laŭ la neplenaj informoj, pri kiuj ni disponas, jam estas fonditaj ĉ. 60 E-klubo kaj E-sekcioj de lernantoj, kiuj funkcias kiel kolektivaj membroj de la Klubo de Internacia Amikeco en la lernejoj.

Tiuj ĉi grandaj sukcesoj fariĝis eblaj dank' al la kreskanta aŭtoritato de BEA kaj dank' al la ĝustatempa iniciato de ĝia Instruista Sekcio. Nun la tasko estas largigi kaj multigi la sukcesojn: en la lernejoj oni estigu novajn lernogrupojn, organizu ĉiujn E-lernantojn en kluboj aŭ sekcioj, en kiuj sub la gvido de la E-instruistoj bolu vigla kultura, ide-eduka, amatora kaj organiza vivo. Nur tiel Esperanto

povas enradikiĝi profunde en la vivon de la lernejoj, okupi neŝanceleblajn poziciojn en la studprogramoj. Tiurilate Bulgario vere povas doni ekzemplon en tutmonda skalo. Tio respondas al la fortoj kaj eblecoj de la bulgara E-movado, kiu ĝuas senduban aŭtoritaton kaj enlande, kaj eksterlande.

Lige kun tiu ĉefa kaj plej urĝa tasko la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA devas mobilizi ĉiujn fortojn por efektiviĝi vastan informan kaj klarigan laboron inter lernantoj, instruistoj, lernejgvidantoj kaj en la konsilantaroj de popola klerigo. Eĉ ne unu lernejo, kie ekzistas preta E-instruisto, devas resti sen E-klaso. Kie mankas instruisto, la estraroj rekomendu konvenan eksterlernejan instruanton.

En septembro la distriktaj kaj societaj estraroj devas mobilizi ĉiujn siajn fortojn por fini tion, kion ili komencis aŭ ne sukcesis komenci en junio-julio por prepari la novan lernojaron, ĉar prokrastoj ne plu eblas. Por sukcese altiri lernantojn kaj instruistojn al E-lernado, oni devas entrepreni samtempan grandamplaksan propagandon de Esperanto per vidaj rimedoj (afiŝoj, sloganoj, vitrinoj, agitantguletoj, agittabuloj, flugfolioj ka.), per lokaj radioparoliloj, loka gazetaro ktp., per kunvenoj-koncertoj nepre kun programoj en bulgara lingvo kaj Esperanto, per aktiva individua agitado fare de ĉiuj membroj, konkrete distribuitaj por tiu urĝa kaj gravega laboro. Tre bonrezultaj tiurilate estas la unu-dutagaj renkontiĝoj de kompetentaj E-agantoj kun direktoroj, vicdirektoroj, partiaj sekretarioj kaj sindikataj gvidantoj el lernejoj kaj ankaŭ de reprezentantoj de fakoj de popola klerigo. Tiuj

renkontiĝoj devas okazi en agrabla, alloga ri-pozloko. Kompreneble, ilia financa flanko devas esti prizorgata de la koncerna E-estraro. En tiaj renkontiĝoj oni devas konvinke prezenti la signifon kaj utilon de Esperanto, aparte ĝian instruan kaj edukan valoron, klarigi la celojn kaj la valoran praktikan laboron de la esperantistoj.

La enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la mezajn lernejojn starigis ankoraŭ pli akre la problemon pri E-instruistoj. Ĝis nun ĉiujare diplomigas nur ĉ. 30—35 E-instruistoj, precipe en nia Internacia E-Kursejo en Pisanica. Tio estas tute nesufiĉa kaj por la lernejoj, kaj por la civitanaj kursoj, ĉar la bezonoj kreskas senĉese. Oni devas urĝe ŝanĝi tiun situacion.

Jam venis la tempo, kiam niaj distriktaj estraroj kaj la societaj estraroj en pli grandaj loĝlokoj devas mem organizi la preparon de E-instruantoj el inter la profesiaj instruistoj — en surloke organizitaj distriktaj kaj urbaj instruistaj kursoj. Tie, kie ne estas eble organizi kurson nur el profesiaj instruistoj, oni klopodu inkludi laŭeble pli da instruistoj en la ĝeneralajn civitanajn kursojn. Grava tasko de la estraroj estas morale kaj materiale subteni la kandidatojn, por ke ili povu trapasi ĉiujn lernogradojn kaj diplomigi kiel plenrajtaj E-instruistoj. Oni do devas pagi entute aŭ parte la elspezojn de kapablaj, perspektivaj instruistoj, kiuj konsentas estonte nepre instrui Esperanton. Tiuj instruistoj, kiuj pro unu aŭ alia kaŭzo ne havas eblecon viziti ĉeeston kurson, devas esti direktitaj al loka koresponda kurso aŭ al la Centra Koresponda Kurso, administrata de la Internacia E-Kursejo. Tiuj kursanoj kolektiĝas nur 1—2-foje en la monato, dum la cetera tempo ili lernas memstare hejme kaj sendas al sia gvidanto difinitajn kontrolekzercojn. En la vintraj kaj printempaj ferioj ili povas havi tutsemajnan lernadon kun ĉ. 30 lernohoroj sub la zorgo de sia gvidanto.

Por la jam diplomitaj E-instruistoj la estraroj devas certigi superajn formojn de perfektigado — parolantajn, literaturajn kaj aliajn rondojn, kantgrupojn, kursojn por tradukistoj kaj kunlaborantoj de la E-gazetaro, partoprenon en la Internacia Somera E-Universitato en Veliko Târnovo ka.

Por refreŝigo kaj plialtigo de la metodika nivelo, ĉiuj distriktaj estraroj devas organizi ne longedaŭrajn metodikajn seminariojn kaj kon-

siliĝojn. En ili oni devas diskuti interesajn teoriajn demandojn el la metodiko de Esperanto-instruado kaj ankaŭ fari demonstraĵojn lecionojn ĉiam kun postaj diskutoj. La organizo de similaj metodikaj kolektiĝoj estas utila ĉiam, sed aparte ĝi estas necesa kaj utila en la komenco de ĉiu nova lernojaro, ĉar tiam oni havas la eblecon trakti ankaŭ la organizan staton de la instrulaboro. Tre utila postdiploma perfektiga formo estas la seminarioj enkadre de la semajnaj vintraj kaj printempaj kursoj.

La distriktaj kaj societaj estraroj kaj la E-instruistoj mem devas klopodi pli multe por havigi instruhelpilojn — kaj klasikajn (bildojn, pupojn, ludilojn, interesajn objektojn), kaj modernajn (gramofonon, magnetofonon, kasetofonon, diapozitivojn ka.) Lingvoinstruado sen instruhelpiloj ne povas esti bonrezulta. Por aĉeto de instruhelpiloj la estraroj devas havi konstantan zorgon. Komence oni formu modestan metodikan punkton, kiu estiĝu la kerno de estonta metodika kabineto.

La instrulaboro de la civitanaj E-societoj ampleksas regule inter 4000—5000 homojn. Tio estas bona, sed ankaŭ ĉitie ni havas gravajn mankojn: oni malfermas precipe ĝeneralajn civitanajn kursojn, sed malmulte aŭ tute ne kursojn en grandaj industriaj entreprenoj (fabrikoj, uzinoj), gravaj oficejoj kaj sciencaj institutoj. Jam venis la tempo, kiam ni devas serioze preni sur nin la taskon altiri al Esperanto la laboristan klason, inĝenier-teknikajn kadrojn, sciencajn specialistojn, ĉar unu el la plej grandaj kaj aktualaj taskoj de la bulgara E-movado nun estas — ĉiam pli intime ligi Esperanton kun la scienc-teknika progreso, kun pli reala partopreno en la konstruado de matura socialisma socio en nia patrujo.

Fine ni deziras substreki esence gravan postulon al nia instrulaboro: ĉiuj E-estraroj — de la Centra ĝis la societa — devas organizi ĝin en intima kunlaboro kun la ŝtataj klerigaj organoj. Oni devas fari ĝin ankaŭ kun la helpo de aliaj kulturaj kaj sociaj organizaĵoj: Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, packomitatoj ka. Ĉar nia E-laboro neniel estas memcela, ĝi estas valora populutila laboro kaj devas efektiviĝi man-en-mane kun la ceteraj sociaj kaj kulturaj organizaĵoj, devas esti nedisigebla parto de la nuntempa ĉiufanka vivo de nia supreniranta socialisma socio.

KUNĈO VÁLEV

Pri la E-instruado en Sofio

La Urba Estraro de BEA en Sofio ĉiam atentas pri la instrulaboro kiel baza ebleco por popularigo kaj disvastigo de Esperanto, por pliprofundigo de la scioj kaj plivastigo de la eblecoj por ĝia konkreta aplikado. En la ĉefurbo tiun ĉi agadon organizas, akordigas, kelkiam financas kaj metodike gvidas speciala laborgrupo ĉe UE de BEA — la tiel nomita Instrumetodika Centro (IMC).

Plej grava tasko de IMC estas la preparado de plenrajtaj kaj altkvalifikitaj E-instruistoj, ĉar por la nuna momento ili tute ne sufiĉas por urbo kun pli ol miliono da loĝantoj.

Konforme al la decido de la Ĉefurba Konsilantaro pri Popola Klerigo oni okazigas senpagajn kursojn por instruistoj. Al la tempo por partopreno en tiuj ĉi kursoj oni rigardas kiel al ofica okupateco.

Por popularigo de la lingvo inter estraranoj de la ĉefurba kleriga sistemo, UE de BEA ĉiujare okazigas seminarion por direktoroj de lernejoj, specialistoj el la Subdistriktaj Konsilantaroj kaj el la Ministerio de Popola Klerigo. Lektoroj estas eminentaj bulgaraj esperantologoj kaj aktivuloj de la esperantista movado en Bulgario.

Samtempe estis kreita sistemo por spirita kaj materiala stimulado de la lektoroj kaj instruistoj. Por altiri al instruagado novajn E-instruistojn, UE de BEA pagas al la perspektivaj kursanoj-instruistoj 50% de la prezo por lernado en 20-tagaj kursoj en IEK-Pisnica. Al la kursanoj, kiuj ekzameniĝis pri instrurajto kun bonega sukceso, la estraro pagas la tutan takson por la kurso.

Jam kelkajn jarojn UE de BEA efektivas kompleksan programon por lernado de la Internacia Lingvo en ĉiuj kategorioj de lernejoj kaj en kulturdomoj. Per tiu ĉi programo oni celas altiri amase infanojn, gejunulojn kaj civitanojn kaj garantii seninterrompecon en la E-lernado de ĉiuj aĝgrupoj.

Reformante la nacian klerigan sistemon kaj konsiderante la estontan gravecon de la Internacia Lingvo, la Ministerio de Popola Klerigo enkondukis ĝin kiel fakultativan lernobjekton en IX-an kaj X-an klasojn de la nova Unueca Politeknika Meza Lernejo. Dum la ĵus pasinta lernojaro en la sofiaj lernejoj funkciis pli ol 20 grupoj, kiuj fakultative lernis Esperanton.

Granda sukceso ne nur por la ĉefurba, sed ankaŭ por la tutlanda E-movado estas la permeso de la Ministerio de Popola Klerigo eksperimente instrui Esperanton kiel devigan lernobjekton paralele kun la angla, franca kaj germana lingvoj en unu klaso de VIII mezlernejo en Sofio.

La Instrumetodika Centro ĉe UE de BEA organizas ankaŭ E-kursojn por civitanoj (por I-a, II-a kaj III-a grado). En kelkaj oficejoj kaj fabrikoj, laŭ iniciato de subdistriktaj E-societoj kaj de lokaj sindikataj estraroj, same funkcias grupoj por lernado de Esperanto.

En Sofio oni pripensas iujn novajn ideojn pri popularigo de la Internacia Lingvo, por pli interesa konatiĝo kun la lingvo-ekzemple pere de lokaj radioelsendoj kaj distriktaj periodaĵoj.

Bonan eblecon okazigi kunvenojn por interŝanĝo de sperto, plialtigado de la lingvoscioj kaj simple por E-babilado disponigas la Centra Domo de Instruistoj en Sofio, kie funkcias Klubo de Instruistoj-Esperantistoj.

La intereso al la Internacia Lingvo ĉiujare kreskas. Nur en Sofio ĝin lernas pli ol 300 civitanoj jare. Sian popularecon Esperanto ŝuldas ne nur al siaj lingvistikaj specifaĵoj, sed ankaŭ al la humanismaj kaj porpacaj principoj de la tutmonda esperantista movado.

Inĝ. Ivan PACOV

FREŜAJ FORTOJ POR NIA E-MOVADO

De niaj antaŭaj publikaĵoj vi, estimataj legantoj, jam scias pri la eksperimento en VIII „D“ klaso de 8-a Sofia Unueca Politeknika Mezlernejo. Ekde septembro pasintjare 37 gelernantoj devige lernas paralele Esperanton kaj la anglan lingvon po 3 horoj semajne.

Kiaj estas la rezultoj de tiu eksperimento en la fino de la unua lernojaro? Pri ili rakontas la lerneja direktorino Sijka Peltekova:

— Grava tasko de la lerneja estraro estis garantii la necesajn kondiĉojn por okazigo de la eksperimento. Por la E-klaso ni elektis

nur bonegajn lernantojn. Ili lernas la Internacian Lingvon laŭ zorge preparita programo. La rezultoj ne malfruigis — la kontrolaj skribekzercoj pruvigis ilian bonan preparecon kaj solidajn sciojn. Ni strebas liberigi la lernantojn-esperantistojn de aldonaj eksterlernejaj taskoj, ĉar ili estas pli okupataj ol siaj kunlernantoj el la aliaj klasoj — ja ili lernas unu plian lingvon! Mi opinias, ke la lernado de Esperanto pliriĉigas la konojn de niaj edukatoj.

La unua paŝo jam estas farita. Ekde januaro la gelernantoj ekkorespondis kun samaĝuloj el USSR, GDR, Hungario, Japanio, Italio, Aŭstrio, Britujo kaj el aliaj landoj. Kaj jen agrabla fakto: la junaj esperantistoj lernis Esperanton nur tri monatojn, kaj jam sukcese aplikas siajn lingvosciojn. Lerninte dum du jaroj anglan lingvon, ili tamen nepovas libere korespondi kun gejunuloj, kies lingvo estas la angla. Do, la konkuradon gajnis Esperanto.

Komence ne ĉiuj lernantoj estis konvinkitaj, ke ili preferas lerni la Internacian Lingvon, sed poste ili bone komprenis ĝiajn avantaĝojn kaj nun ili mem vigle propagandas ĝin. Deko da gejunuloj tamen venis en tiun klason speciale por lerni Esperanton.

La junaj esperantistoj sukcese partoprenis la XVIII Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto en Haskovo ĉi-printempe. Ilia kantgrupo gajnis unuan premion.

Dum la someraj ferioj, en la Internacia Esperanto-Kursejo (en Pisanica), la lernantoj-esperantistoj pere de la Internacia Lingvo starigos kontaktojn kun alilandanoj.

Iuj el la lernantoj intencas partopreni an-

kaŭ la ĉi-jaran Internacian E-laborbrigadon en Pleven.

En VIII „D“ klaso Esperanton instruas la multjara sperta esperantisto Georgi Dejanov. Li estas kontenta pri siaj gelernantoj:

— Nun ni lernas laŭ la lernolibro de prof. Istvan Szerdahelyi „Esperanto—I“. Venontjare ni daŭrigos nian lernadon laŭ la dua parto de tiu lernolibro. Dum la tria lernojaro ni havos tre interesajn lecionojn pri originala kaj traduka E-literaturo kaj pri historio de la lingvo kaj la E-movado. Jam nun ni enkondukas apartajn elementojn de tiu ĉi programo. Nia strebo estas, ke fine de ĉiu lernojaro niaj gelernantoj ricevu diplomon por la koncerna grado de lingvoposedo. La respondeculoj pri la eksperimento kaj la lerneja estraro havas la ambicion ĉiujare organizi po unu E-klason. Tiu estas la vojo, laŭ kiu ni senĉese havigos freŝajn fortojn por nia E-movado.

Maria JANKOVA

UNUA PLENKUNSIDO DE BEJ-ESTRARO

Cefa direkto en la aktivado de la estraro de BEJ (Bulgara Esperantista Junularo) estas la kreado de kapablaj kaj talentaj E-kadroj elinter la gejunuloj kaj de solida Esperantista junulara reto en la tuta lando.

Post la elekto de nova sekcia estraro (en la speciala konferenco enkadre de la ĉi-jara Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Haskovo), la 15-an de junio en Sofio okazis ĝia unua plenkunsido. Ĉeestis la membroj de la Buroo de BEJ kaj preskaŭ ĉiuj membroj de la Komitato de BEJ. (Faktela lastaj estas junaj E-aktivuloj el iuj distriktaj estraroj.)

Tiun nacian renkontiĝon partoprenis pli ol 20 aktivuloj. Cvetka Miteva — prezidantino de BEJ, gvidis la plenkunsidon.

Oni donis metodikajn instrukciojn kaj poste la ĉeestantoj faris konkretajn proponojn lige kun la plano pri la estonta 4-jara agado de BEJ. La ĝeneralaj ĉiujaraj junularaj E-iniciatoj ankaŭ estonte estas: Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto, Aŭtuna Seminario por E-Aktivuloj kun internacia partopreno kaj la decembra Nacia Studenta Renkontiĝo.

Cvetka Miteva, kiu estos reprezentanto de BEJ en la ĉi-jara TEJO-kongreso, parolis pri la demandoj, kiujn pridiskutos la kongresanoj.

Hristo Filipov el Pleven rakontis pri la ĉi-someraj internacia junulara brigado en Guljanci, distrikto de Pleven kaj turista mar-

ŝo en Pirin-montaro.

Interesajn eldirojn faris Ljubomir Trifonĉovski el Vraca, Angel Ciklovski el Blagoevgrad, Hristina Nikolova el Pazarĝik, Petja Sirjanova el Veliko Târnovo, Svetlana Veleva el Ruse k. a. Jen iuj el iliaj proponoj:

— Dum la naciaj junularaj E-iniciatoj oni parolu nur en Esperanto, ĉar ofte ilin partoprenas ankaŭ eksterlandanoj. Pro tio estas necese tuj komenci aktivan laboron por altigi la lingvoposedon de la gejunuloj.

— La Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto okazu kunlabore kun la Centro pri Amatora Artaktivado ĉe la Komitato de Kulturo kaj la statuto de la revuo restu konstanta dum la kvinjara periodo.

— La gejunuloj-esperantistoj laboru kune kun la lokaj komsomolaj komitatoj kaj ĉe organizado de E-iniciatoj serĉu ilian helpon.

— Oni preparu E-partoprenon en la estontaj Festivaloj de Engaĝiĝintaj Kantoj „Alen Mak“ („Punca Papavo“) en Blagoevgrad.

— Dum la junpioniraj kaj mezlernejanaj ferioj en kampadejoj oni organizu E-kursojn por altiri novajn adeptojn de Esperanto kaj por subteni la lingvan nivelon de tiuj, kiuj jam lernas la Internacian Lingvon.

Post tiuj pridiskutoj, dum la amuza parto, la ĉeestantoj havis la eblecon ĝui la debuton de la junulara Esperantista voĉa-instrumenta grupo „Espero“.

M. B.

ANTAŬKONGRESA VIRINA KONFERENCO

La 15-an de junio k. j. en la klubejo sur strato „Knjaz Boris I“, 66 en Sofio, lige kun la antaŭstaranta 41-a Nacia Kongreso de BEA, okazis konferenco de la Virina Komisiono ĉe BEA. Partoprenis virinoj-aktivulinoj de la E-movado el Sofio kaj reprezentantinoj de la distriktaj estraroj en la lando.

En sia raporto s-ino Belka Beleva, prezidantino de la Komisiono, detale informis pri la organiza laboro dum la periodo 1980—1985. Ŝi emfazis la plej gravajn momentojn el la historio de la virina E-agado, ĝiajn plej elstarajn atingojn kaj sukcesojn.

En la ripoz-paŭzo la virinoj havis eblecon interŝanĝi opiniojn kaj sperton. En la salono estis ordigita malgranda, sed enhavoriĉa ekspozicio, reflektanta la vivon de la Komisiono, la partoprenon de virinoj-esperantistinoj en diversaj E-aranĝoj kaj iniciatoj en nia lando kaj eksterlande. Revuoj, leteroj, fotoj, donacoj k. a. altiris ĉies atenton. Tiu malgranda, sed valora arkivo atestas pri la aktiveco de la virinoj-esperantistinoj, de la estraro de la Komisiono, donanta sian kontribuon al la organiza vivo de BEA.

En la nomo de CE de BEA la konferencon varme salutis s-ano Petăr Todorov. Li donis altan pritakson de la virina E-agado, promesante la helpon kaj kunagon de la Asocio, substrekkis diversajn iniciatojn de BEA, en kiuj la virinoj estas aktivaj partoprenantoj, kunlaborantoj kaj organizantoj.

Surbaze de la interesa raporto sekvis viglaj kaj valoraj eldiroj kaj diskutoj, en kiuj la virinoj informis pri la atingitaj sukcesoj en iliaj sekcioj kaj societoj, pridiskutis diversajn problemojn, aperintajn ĉu pro manko de sperto, ĉu pro ne sufiĉa informiteco. Ili tute spontane kaj sincere dividis sian ĝojon pro la rezultoj de sia laboro. Ne mankis memkritiko.

Bone impresis la variaj iniciatoj en la distriktoj, kiuj pruvis la entuziasmon de la virinoj. Estis prezentitaj interesaj opinioj, atengitoj, novaj ideoj, proponoj, rekomendoj. Ĉiuj parolintoj esprimis kontentigon pri la raporto de la estraro kaj samtempe sian bedaŭron, ke virinaj renkontiĝoj ne okazas pli ofte.

Kortuŝaj momentoj estis la enmanigo de donaco-memorajo al la Komisiono fare de s-ino Elena Stojkova el Burgas, la deklamo de propra versaĵo de Penka Papazova kaj varma infana saluto per E-vortoj de la 8-jara knabo Emil Karev. Li emociis ĉiujn per sia kantado, varmigis niajn korojn!

Konklude s-ino Belka Beleva dankis al la partoprenintoj en la konferenco pro ilia ĉeesto kaj aktiveco en la diskutoj, pro iliaj proponoj kaj rekomendoj, pro la senditaj informoj. Ŝi donis koncizan informon pri la estonta laboro de la Komisiono kaj de ĝia estraro kaj denove substrekkis la bazajn taskojn, el kiuj la plej grava estas lernado de la Internacia Lingvo ĝis ĝia plena ekposedo.

LILIJA KOLEVA

Ĝojigaj rezultoj

La popola aŭtoritato favore rilatas al la E-movado en Bulgario, zorgas pri ties evoluo kaj disvastigo. Esprimo de tiuj ĉi zorgoj estas la fondita ĉe la Urba Estraro ekonomia entrepreno „Globus“, kies aktivado kaj la atingitaj rezultoj prezentas solidan fundamenton por financi la diversflankan esperantan agadon en la ĉefurbo — instruan, kultur-klerigan, ktp.

En sia raporto la direktoro de „Globus“ inĝ. N. Kostov funde analizis la sukcesojn de la entrepreno. La laboristoj de la entrepreno ambicie strebas produkti nur bonkvalitajn ellaborajojn, atingi pli bonajn ekonomiajn rezultojn per plialtigo de la efektiveco de produktado.

La vic-prezidanto de la Sofia Urba Estraro kaj prezidanto de la Komisiono pri Konkuro Haim Levi raportis pri la rezultoj de la konkurado, organizita omaĝe al la 41-a kon-

greso de BEA inter la 20 E-societoj en Sofio.

La plenkunsido akceptis la proponon de la Komisiono kaj decidis distingi per monpremioj jenajn societojn:

— Per unua premio — la ĉefurbajn subdistriktajn societojn „N. Sopov“, „N. Botuŝev“ kaj „d-ro St. Vasilev“:

— Per dua premio — societojn „Penka Miĥajlova“ kaj „Solidareco“ — Bankja.

— Trian premion recevas aliaj kvar sofiaj societoj.

La plenkunsido esprimis sian kontentecon pro la tre alta aktiveco de la sofia esperantistaro ĉe realigo de la konkurado honore al la 41 Kongreso de BEA.

H. L.

LIBERON POR ANTONOV!

La 12-an de junio j. k. la sofiaj esperantistoj kunvenis en sia klubejo sur strato „Serdika“ 13 por deklari siajn pensojn kaj sentojn lige kun la jam komenciĝinta en Romo juĝproceso kontraŭ la senkulpaj bulgaraj civitanoj Sergej Antonov, Ĵeljo Vasilev kaj Todor Ajvazov. Organizantoj de tiu protesta kunveno estis la Sofia Esperantista Kultura Centro „Maksim Gorkij“, la Bulgara MEM-Komitato kaj la Sekcio de Juristoj ĉe BEA.

Tre interesa, faktoplena kaj kompetenta estis la raporto de Dimităr Haĝiev — prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato kaj vicprezidanto de la Sekcio de Juristoj ĉe BEA. Li memorigis al la publiko la eventojn, kiuj antaŭis la juĝprocezon kaj emfazis, ke la senbaza akuzo pri bulgara partopreno en la atenco kontraŭ papo Johano-Paŭlo la Dua estas provoko, direktita ne nur kontraŭ apartaj personoj — Sergej Antonov, Ĵeljo Vasilev kaj Todor Ajvazov, sed ankaŭ kontraŭ Bulgario kaj kontraŭ la socialisma komunajo ĝenerale. La ĉeestantoj direktis al la preleganto multajn demandojn.

Poste Maria Jankova-Bojaĝieva — redaktorino en revuo „Bulgara Esperantisto“, parolis pri la resonado de tiu juĝproceso en ekster-

lando. Si substrekiis, ke en la Okcidento ĉiam pli multaj homoj bone komprenas, ke en la atenco kontraŭ la papo ekzistas nenio „bulgara spuro“ kaj ke la „afero Antonov“ estas elpensita por kalumnii la socialisman realaĵon.

En la nomo de la kunveno oni sendis protestan telegramon al la Nacia Komitato por Defendo de Sergej Antonov.

(daŭrigo de p. 11)

kun la tuta socialisma mondo estas necesa kondiĉo por la sukcesa senmaskigo de la provoko. Tiurilate grava estas la tasko de la bulgaraj esperantistoj kaj speciale de la juristoj-esperantistoj kaj de la aktivuloj de MEM. Ili devas klarigi al siaj fremdlandaj amikoj kaj korespondantoj, ke Popola Respubliko Bulgario, kiel socialisma lando, kiu efektivas politikon de paca kunezistado de ŝtatoj kun malsamaj politikaj kaj sociaj ordoj, ne okupiĝas pri terorismo. La terorismo estas jam delonge kondamnita kiel rimedo por solvo de politikaj kaj sociaj problemoj.

Do, al laboro, karaj gesamideanoj! Esperanto servu al la justeco, al la defendo de la homaj rajtoj kaj al la paco!

DIMITĂR HAĜIEV

TELEGRAMO

*Al la Nacia Komitato por
Defendo de Sergej Antonov
Sofio*

Kamaradoj,

Kun maltrankvilo kaj espero ni observas la disvolviĝon de la juĝproceso kontraŭ nia samlandano Sergej Antonov.

Kun maltrankvilo — ĉar ne semajnojn, eĉ ne monatojn, sed jam preskaŭ du jarojn unu senkulpa homo estas malliberigita nur pro la mensogoj kaj kalumnioj de la krimulo — murdisto kaj teroristo Mehmet Ali Agca.

Kun espero — ke la vero finfine triumfos kaj estos malkaŝita la vera fizionomio de la kulpuloj pri tiu monstra provoko kontraŭ nia patrolando kaj kontraŭ la socialisma mondo.

En tiuj malfacilaj por Sergej Antonov tagoj ni, la bulgaraj esperantistoj, deziras diri al li: kuraĝon Sergej! Vi ne estas sola! Viaj alianconoj estas la vero kaj ĉiuj honestaj kaj progresemaĵoj homoj en la mondo.

La 12-an de junio 1985

*De la kunveno de sofiaj
esperantistoj*

Emocia memorkunveno

Ĉi-jare la nomo de Trifon Ĥristovski — verkisto-revoluciulo, komunisto kaj arda esperantisto, okupas centran lokon en la aktivado de la bulgaraj esperantistoj. Lige kun la 80-a datreveno de lia naskiĝo en Botevgrad okazis solena celebros, aperis speciala dokumenta filmo pri lia vivo kaj agado; ĵurnalistoj kaj specialistoj studas lian verkaron kaj liajn E-korespondadojn, preparas publikaĵojn.

La 5-an de junio k. j. en la Centra Domo de Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo en Sofio okazis kunveno omaĝe al la 41-a datreveno de la morto de Trifon Ĥristovski, organizita de Bulgara Esperantista Asocio.

La kunvenon ĉeestis parencoj, intimaj amikoj, korespondantoj kaj kunagantoj de Trifon Ĥristovski, inter kiuj estis la verkistoj Pelin Velkon, Ivan Burin, prof. Stanev, multaj esperantistoj el Sofio kaj el aliaj urboj de la lando.

En sia enkonduka parolo la veterano de la bulgara E-movado kaj honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev priskribis la plej gravajn momentojn el la vivo de tiu eksterordinara homo, kiu estas imitinda ekzemplo por la juna generacio.

Bonega estis la ideo de Stefka Ĉenkova el a Centra Oficejo de BEA, estante sur la scenejo, interparoli en maniero de intervjuo kun kelkaj el la intimaj amikoj kaj korespondantoj de Ĥristovski: Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA, merita aganto de la kulturo, prof. Stanev el la Supera Ekonomika Instituto en Sviŝtov, Suzana Garti — aktiva kontraŭfaŝistino, la instruisto Dikov el la naskiĝloko de Ĥristovski — Radotina, kaj kun lia frato Dimitar Ĥristovski.

Oni rakontis tre interesajn kaj kortuŝajn rememorojn pri la personeco, vivo kaj agado de Trifon Ĥristovski, kies faron oni intencas popularigi en nia lando kaj eksterlande.

Alternis rememoroj de liaj kamaradoj kaj recitaĵoj de fragmentoj el verkoj kaj leteroj de Ĥristovski fare de la aktorino Belka Beleva, kun akompano de la kvarteto „Espero“ gvidata de Radoslav Dojĉinov.

Post tralego fare de N. Aleksiev de ricevitaĵo el la lando kaj el eksterlando telegramoj, okazis projekciado de la dokumenta filmo „Trifon Ĥristovski“.

Tiu emocia solenaĵo estas vera modelo pri interesa organizado de niaj E-kunvenoj.

R. BANĈEVSKI

Rememoro pri Asen Grigorov

Mi konatiĝis kun Asen Grigorov kiam li estis jam blankhara maljunulo, estis jam forinta la pli grandan parton de sia vivovojo, poŝtista oficisto, batalanto-komunisto, fama esperantisto, poeto, ĵurnalistoj, sekretario de Georgi Dimitrov. . . Vizitinte por unua fojo lian domon, mi admiris lian riĉan Esperantan bibliotekon. Tiam li invitis min estiĝi membro de la gvidata de li Literatura Rondo. Mi konsentis kaj — jam mezaĝa homo, komencis verki en Esperanto. Tiel komenciĝis nia longedaŭra amikeco kaj kunlaboro sur la literatura kampo. Mi povas diri, ke tiu ĉi rondo estis vera lernejo por mi. Mi sendis miajn manuskriptojn al li, li resendis ilin al mi kaj mi atente trarigardis miajn multenombrajn erarojn — gramatikajn, stilajn. . . Li ne toleris mian malbonan skribmanieron kaj mi diligente reskribis la korektitajn de li manuskriptojn, antaŭ ol doni ilin al nia tajpistino.

Pridiskutinte en la kunvenoj de nia rondo verkojn de iu el la rondanoj, ni ĉiam malpacience atendis lian eldiron. Kiam li laŭdis, ni ĉiuj sciis, ke li merite kaj sincere laŭdas. Kritikante nin, li multfoje emfazis, ke ne estus utilo de niaj kunvenoj, se ni ne montrus unu al alia niajn erarojn. Kaj la ofenditaj de kritiko devis konfesi, ke li pravas.

Neforgesebla estas por mi la solena kunveno okaze de la 20-ajarigo de la Literatura Rondo. Unu post alia legis siajn verkojn la rondanoj. La publiko aplaŭdis nin, sed nin turmentis la penso: „Ĉu li venos en tiu ĉi terura vetero?“. . . Li jam loĝis en la pensiono de batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo ekster la urbo. Tamen je la finiĝo de la kunveno li venis. Preninte la vorton, li parolis pri la historio de la rondo, pri la metodoj de nia laboro, esprimis sian esperon, ke al ni aliĝos junaj verkemuloj. Sajnas al mi, ke tio estis lia lasta publika parolado.

La apero de la longe atendata de ni „Almanako de bulgaraj esperantistoj“ sub lia redaktado preskaŭ koincidis kun la jubileo de la Rondo. Ĉiu el ni ĝojis, rigardante tiun ĉi bonaspektan libron, enhavantan niajn verkojn, ĝis nun presatajn dise en la revuoj. Ĝi estis krono de nia komuna laboro.

Kaj nun, kiam li ne estas jam inter ni, pensante pri li, pri ĉiu lia eldiro kaj ĉe gesto, kiuj senorde aperas en mia kapo, ŝajnas al mi, ke li staras antaŭ mi pli reliefa, pli perceptebla ol en la tempo, kiam li estis viva. Eble pro tio, ke mi ankoraŭ ne povas paciĝi kun la fakto, ke li ne plu vivas. Sed vivas kaj vivos la nobla afero, al kiu li servis, kaj ni sekvas lian ekzemplon.

Stefan SOKOLOV

AL ASEN GRIGOROV

En unu koro
amasigis vi fervoron
por laboro
senripoza,
sindonema,
por bono de l' popolo,
por la movado Esperanta,
por paco en la mondo.

Per via plumo
testamentis vi el koro
al la homoj:
„Gardu la pacon!
Gardu la vivon!“
por ke la floroj estu,
kaj la infanoj estu gajaj,
kaj estu amo kaj feliĉo.

Vi ne plu estos
inter ni, vivantaj homoj,
Sed vi vivos
en la koroj
en la libroj.
Vi montris al ni saĝe
kiel labori nun senlace
kaj esti veraj homoj.

Ripozu, karmemora, pace!

MARIA P. ANGELOVA

FUNEBRAJO

Memore kaj akrostike al ASEN
GRIGOROV, elstara E-veterano, eks-
sekretario de GEORGI DIMITROV.

Amare ni kun vi disiĝos;
senfine ĝemas nia koro,
enbruste premas nin doloro,
neniam la ĉagren' foriĝos!

Grandega bardo-paggardisto,
rondetgvidanto verd-beletra,
internacia ĵurnalisto,
gramatikisto sencpenetra,
okupiganto ĉiufanka,
renoma E-vortarfaranto,
originala tradukanto —
vi brilos por idaro dankaj!

ASEN JOSIFOV

Sofio, 24.05.1985

niaj e-veteranoj



PROF. D-RO MIHAIL D. POPOV 80-JARA

La Internacian Lingvon prof. M. Popov lernis kiel gimnaziano en urbo Radomir en 1920-1921, en la kursoj, gvidataj de la tiama fervojstaciestro Stojan Vasiliev.

Kune kun la nunaj elstaraj esperantistoj Kiril Drajev kaj la verkisto Slavĉo Vasev — heroo de la socialisma laboro, Popov estas unu el la fondintoj de la loka gelernanta E-societo „Fajrero“.

Dum la lernoĵaro 1925-1926, kiel studento pri agronomio, kune kun la nun konata esperantisto kaj elstara sciencisto prof. ing. Vasil Peevski — popola aganto de la scienco, Popov organizis studentan E-societon en la Sofia Universitato. Li estis elektita kiel prezidanto de la societo, kaj Peevski estis ĝia sekretario.

Meze de la 50-aj jaroj estis fondita E-sekcio ĉe la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario (ASLB) ĉe-kape kun prof. Peevski kiel prezidanto, prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — merita aganto de la kulturo, kaj akad. prof. Petăr Dinekov kiel vicprezidantoj kaj prof. Popov — kiel sekretario.

Laŭ iniciato de la Sekcio ASLB prenis sur sin la eldonadon en Esperanto de la organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj „Scienca Mondo“, kiu aperas en angla, franca kaj rusa lingvoj.

Antaŭ kelkaj monatoj prof. Popov festis sian 80-jariĝon. Al la jubileulo niajn sincerajn gratulojn kaj bondezirajn!

niaj e-veteranoj

SINDONA E-INSTRUISTO

Antaŭ ne longe la Kjustendila societo „Flamo“ celebris la 70-an naskiĝtagon de la E-veterano Evtim Anĉev — eksa instruisto en diversaj vilaĝoj de distrikto Blagoevgrad. Al la malnova esperantisto estis direktitaj gratuloj, bondeziroj, oni donacis al li freŝajn flo-rojn.

Evtim Anĉev naskiĝis en vilaĝo Ĉervendol — distrikto de Kjustendil. Li lernis en la Kjustendila gimnazio, en 1936 finis la Pedagogian Instituton en u. Stanke Dimitrov.

La unuajn paŝojn al ekposedo de Esperanto E. Anĉev faris en 1938. Lia fidela helpanto estis la lernolibro de ADA. Post la Dua Mondmilito, kiel instruisto de Esperanto kaj multjara sekretario de DE de BEA en Kjustendil kaj sekretario de la urba societo „Flamo“, li strebis praktike realigi la ideon, al kiu servas la Internacia Lingvo — la ideo pri amikeco inter la popoloj kaj mondpaco.

Lige kun lia 70-jara jubileo, sur la brusto de la modesta, laborema instruisto kaj E-veterano ekbrilis la Ora Insigno de BEA. En la konferenco de DE de BEA — Kjustendil, la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vălev enmanigis la altan distingon al la jubileulo.

SVETOZAR MATEV

LA SENCO DE SIA VIVO

Rosica Georgieva naskiĝis en 1920 en malriĉa familio. De la infanaĝo ŝi ekkonas la malfacilaĵojn kaj la mizeron de la vivo. Sed tio ne forprenas ŝian soifon pri scioj kaj en 1941 ŝi finas altlernejon por instruistoj en Plovdiv.

Apenaŭ komencinte sian agadon kiel pedagogo, ŝi estas oficigita kiel direktorino de lernejo en la distrikto. Ŝi ne restas flanke de la komunistaj ideoj. Sed la ĝojo eduki la junan generacion ne longdaŭras. Kormalsano kaj post kelkaj jaroj ankaŭ insida artrito igas ŝin pensiigi en la florado de siaj fortoj — 33-jara ŝi estiĝas pensiulino.

En tiuj jaroj de suferado la konsolo venas per Esperanto — la lingvo de paco, amikeco kaj interkompreniĝo. Okupigante memstare, ŝi ekposedas tre bone la lingvon kaj komencas verki.

Post operacio de la koro, dum ŝia restado en Sofio, Rosica Georgieva konatiĝas kun la aŭtoritataj bulgaraj E-poetoj A. Grigorov kaj S. Simeonov, kiuj vizitis ŝin en la malsanulejo.



Sekvis jaroj de krea laboro por Esperanto — partopreno en internaciaj kongresoj, konkursoj de originala kaj traduka poezio, kunlaboro al esperantaj periodaĵoj. „Bonvenigo“ estas ŝia unua versaĵo, publikigita en „Bulgara Esperantisto“ en 1961.

Dum 15 jaroj ŝi sendas al „Bulgara Esperantisto“ kaj al aliaj E-periodaĵoj informojn pri la esperanta agado en Pazarĝik.

Rosica Georgieva partoprenas multajn landajn kaj eksterlandajn konkursojn pri Esperanto-poezio kaj ricevas diversajn premiojn.

En 1980, okaze de la 70-jara jubileo de E-societo „Radio“ en Pazarĝik, ŝi estas distingita per la ora insigno de BEA pro aktiva E-agado.

Malgraŭ sia malbona sanstato ŝi plu laboras por kaj per Esperanto, ĉar ĝi estas la senco de ŝia vivo.

Grozdenka FILIPOVA

Hristina DUDOVA

KORTUSA SOLENAJO

La 19-an de aprilo j. k. la „Arta Klubo“ ĉe la Distrikta Estraro de BEA — Plovdiv, organizis solenajn honore al sia agema membro Toma Ajolov, lige kun lia 60-jara Esperanto-aktivado kaj 40-jara poezia agado.

La solenaĵo okazis en la klubejo de societo „Kulturo“.

Pri la jubileulo parolis liaj amikoj-esperantistoj, inter kiuj Ivan Sivarov kaj Anna Prahova. La sekretario de la Arta Klubo El. Hristodulova kaj Hr. Dodov deklamis proprajn versaĵojn, dediĉitajn al la veterano.

Fine reprezentantoj de la Plovdiva societo „Kulturo“ — Veselina Kurteva, kaj de la Distrikta Estraro en Plovdiv — Fani Mihajlova, salutis la jubileulon.



TURISMO KAJ ESPERANTO

En aŭgusto ĉi-jare la Bulgara Turista Unuiĝo celebros sian 90-jariĝon. Tio estas longa periodo de plifortiĝo kaj disvolviĝo de la organizita turisma agado. Hodiaŭ ni miras pri la iniciatemo de ties unuaj pioniroj frunte de la kolosoj de la bulgara literaturo — la verkistoj Ivan Vazov kaj Aleko Konstantinov. Antaŭ 90 jaroj 300 entuziasmuloj supreniris Ĉerni Vrah — la plej altan pinton de Vitoŝa-monto, kaj per tio metis la komencon de la organizita turisma movado en Bulgario. Ekde la fondiĝo de la unua turista klubo ĝis hodiaŭ multaj turismaj iniciatoj estis realigitaj sub la ĉiam aktuala kaj ne maljuniĝanta alvoko „Ekkonu la Patrolandon, por ĝin ekami“.

En la lastaj jaroj grandan popularecon ricevas ankaŭ la movadoj „Ekkonu sian naskiĝ-regionon“, „Kun paĉjo kaj panjo en la montaro“, „12×40“ kaj aliaj. La Bulgara Turista Unuiĝo, kiel gvidanto de la amasa turismo, akiris grandan sperton en la organizado de turistaj festoj, longdaŭraj marŝadoj, ekspedicioj, konkurado pri orientiĝo k. a. Ĉion ĉi oni faras kun la nobla celo kontribui por plibonigo de la sano kaj fizika stato de la popolo, krei amon al la naturo, eduki en spirito de patriotismo.

Por kontentigi la multflankajn interesojn de civitanoj kaj lernantoj, oni organizas diversajn specojn de turismo — marŝado, biciklado, skiado, surakva turismo. La bulgaraj alpistoj surgrimpis la plej altan pinton de la Tero — Evereston.

La turismo estas intime ligita kun la monda kaj bulgara E-movado. Tio ne estas hazarda. Pere de Esperanto oni efektivas kontaktojn dum vojaĝoj. La turismo kaj Esperanto iras man-en-mane. Eĉ pli — Esperanto priservas la turismon mem.

Por la Bulgara Esperantista Asocio la turisma agado estas parto de ĝia multflanka agado. Jam pli ol 15 jarojn ĉe CE de BEA ekzistas Turista Esperanto-Sekcio (TES). Ĝi subtenas kontaktojn kun Bulgara

Turista Unuiĝo, Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado, „Balkanturist“, la Turista Centro „Pirin“, „Koopturist“, k. a. Laŭ ĝia propono unu el la restoracioj en la turista komplekso „Slanĉev Brjag“ ĉe la Nigra Maro estas nomita „Esperanto“. Jam 14 jarojn oni eldonas kaj disvastigas la bultenon „Bulgario — turismaj informoj“. Dank' al ĝi gesperantistoj el multaj landoj informigas pri diversaj turistaj objektoj en nia lando. Ilin helpas tiurilate ankaŭ la esperantlingvaj faldfolioj „Vojaĝo tra Bulgario“, „Suna Bordo“, „Pamporovo“, k. a. Estis kreitaj la koloraj filmoj „Bulgara somero“ kaj „Flugiloj super Bulgario“, sonigitaj en Esperanto. Serio da diapozitivaj prezentas apartajn vidindaĵojn — belegajn pejzaĝojn, malnovajn domojn, monaĥejojn, muzeojn k. a. La gvidantoj de la Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado trovis tempon por doni intervjuon por la legantoj de revuo „Bulgara Esperantisto“.

La disvolviĝo de la turismo inter geesperantistoj ĉiam estas ĉefa tasko de TES. Ĝiaj kunlaborantoj estas membroj de la Distrikta Estraro de BEA. La turisma agado enkadre de BEA kontribuas ankaŭ por praktikado de Esperanto dum turismaj aranĝoj.

La distrikta kaj societaj estraroj regule okazigas turistajn iniciatojn. Iuj el ili estiĝis tradiciaj. Dum la lastaj jaroj la esperantistaj turistaj aranĝoj plimultiĝis — en 1984 ili estis 54. Dum la kuranta jaro oni antaŭvidas nur 52 turistajn aranĝojn, ĉar laŭ decido de la Plenkunsido de CE de BEA oni devas turni pli grandan atenton al plialtigo de la kvalito de jam ekzistantaj aranĝoj.

Vere menciindaj estas iuj jam renomaj manifestiĝoj. Laŭ iniciato de Anton Antonov el urbo Kubrat jam 10-an fojon okazas la Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista. Manol Ĉolev — fame konata turisto-esperantisto el urbo Velingrad, ĉiujare en majo organizas por eksterlandaj esperantistoj Internacian Seminarion-Ripozon „Tra arbaroj kaj valoj“, kaj en monato septembro — la aranĝon „Internacia E-seminario-Feriado“. La Esperanto-societo „Verda Eskadrono“ en Târgoviște aranĝas du turismajn renkontiĝojn en montodomo „Lisec“, unu el kiuj estas dediĉita al la Monda Junulara Jaro. Multe aktivas sur la turisma kampo E-societo „Solidareco“ en urbo Bankja kun prezidanto Boris Atanasov. Ĝiaj aranĝoj „Printempa E-renkontiĝo en montodomo Ljulin“, „Najtingala Vespero“, „Goreŝljaci — festo de ŝopa folkloro, kaj la festo de strato Esperanto“ jam estas tradiciaj. Bone estis organizitaj „Tagoj de la Fekundeco“ fare de DE de BEA kaj la Distrikta Asocio pri Turismo kaj Feriado en Razgrad. La Internacia Espe-

ranto-Kursejo en Pisanica regule organizas turistajn marŝojn al diversaj naturbelaĵoj kaj montaraj ripozlokoj. De 20-a ĝis 22-a de septembro, post kelkbara interrompo denove okazos la „Festo de Montodomo „Esperanto“.

Por plibonigo de la organizado de esperantista turismo multe kontribuis la Tria Turista Esperanto-Renkontiĝo „Karandila—84“. La partoprenintoj en ĝi pridiskutis la ĝistiaman laboron por preparo, organizado, okazigo kaj popularigo de la esperantistaj turistaj aranĝoj, la rolon kaj la lokon de la Turista Sekcio ĉe BEA kaj akceptis alvokon.

Tiuj problemoj trovis lokon ankaŭ en la raporto de la Unua Turista Esperanto-Konferenco, kiu konstatis, ke la turista E-agado jam montras pli altan organizan nivelon.

La konferenco, en kiu oni parolis nur en Esperanto, akceptis vastan agadprogramon. La Rezolucio enhavas diversajn taskojn en siaj 13 punktoj. Unuj estas pure organizaj: ĝustatempa preparo de la kalendaro de esperantistaj aranĝoj dum 1986, regule sendata al la Internacia Asocio „Monda Turismo“ kaj al revuo „Bulgara Esperantisto“ por presado; klopodo por pliampleksigo de la reto de fakdelegitoj pri turismo enkadre de UEA; helpo al la organizantoj de longdaŭraj aranĝoj k. a.

La Turista Sekcio ĉe BEA daŭrigos sian kunlaboradon kun la turistaj organizaĵoj en nia lando kaj antaŭ ĉio kun la Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado, Bulgara Turisma Unuiĝo k. a. Gravaj taskoj de TES estas aktive helpi la okazigon de la internacia simpozio „Lingvaj obstakloj por la libera evoluo de turismo“; popularigi urbon Bankja kiel centron por esperantista feriado kaj kuracado; organizi grupojn de bulgaraj esperantistoj, kiuj partoprenu gravajn aranĝojn en eksterlando; esplori la eblecojn por stablo de vojaĝoficejo „Esperantoturist“ en Sofio, kiu kontribuos por la disvolviĝo de organizita Esperanto-turismo eksterlande. TES aktive laboros por enkonduko de Esperanto en la Internacia Danuba Regatto „TID-85“, popularigos la esperantistan turismon, sendante konvenajn materialojn al la esperantistaj gazetoj kaj revuoj.

La perspektivoj por efektiviĝo de la turismo pere de Esperanto estas bonegaj.

Ni marŝu kuraĝe antaŭen!

D. MUTUŠEV
Prezidanto de la Turista Sekcio ĉe BEA

EN MONTODOMO „ESPERANTO“

La 19-an de majo j. k. en montodomo „Esto“ okazis kortuŝa renkontiĝo de gelnantoj el VIII-a franclingva klaso ĉe 118 lernejo en Sofio kaj oficistoj el la Ekonomia Direkcio „Globus“ ĉe BEA, kiu estas patrono de tiu klaso. La ĉefdirektoro de „Globus“ Dimităr Mutuŝev, rakontis koncize al la lernantoj pri la kreo kaj evoluo de Esperanto, pri ĝiaj noblaj idealoj, pri la E-movado en nia lando kaj tutmonde. Al ĉiuj ĉeestantoj estis disdonitaj esperantaj faldfolioj pri Suna Bordo ĉe la Nigra Maro. Siaflanke la klasgvidantino — k-dino Gospodinova, en sia nomo kaj en la nomo de la gelnantoj, dankis al Ekonomia Direkcio „Globus“ kaj al k-do D. Mutuŝev pro ilia helpo kaj zorgoj dum la forpasinta 1984/85 lernojar. Tiu neforgesebla renkontiĝo meze de la bela montara naturo restos por ĉiam en la konscio de la partoprenantoj.

V. C.

TURISTA KANTO

Canko Murgin

Kuras nokto, kuras tago —
nigra-blanka temp-faden';
laco en muskol', imago —
tuj al distro, al promen'!

Nu, rapidu kamarado —
al labor' hodiaŭ — fin';
kara mia al vagado
lanĉas nin la korinklin'!

Vojaĝad' kaj promenado,
grimpo al la montopint' —
kant' turista — kanonado,
tra la valoj — fajna tint'...

Montodom' nin bonvenigas —
mola estas la kusen',
grilo kante nin dormigas
milde kisas nin maten'.

Sunoban', ludaro kanta
fort-emana — la seren' —
ŝvelas brust' facilspiranta,
post ferio — al reven'!

Kiom multe mi avidas
eklabori tuj, jam nun —
mi promenis, grimpis, ridis —
sed... laboro — mia sun'...

ĈU NUR HISTORIO?

K-do Dimităr Papazov, juna kaj talenta sekretario de la bulgara E-Asocio, aŭtoro de en Sofio aperinta libreto, titolita „Revuo „Balkana Laboristo“ — tribuno kaj organizanto de laboristaj esperantistoj en Bulgario (1929—1931)“, skribis tiun ĉi libron pri estiĝo kaj disvolvo de la fama revuo „Balkana Laboristo“.

Leginte tiun ĉi libron el Bulgario, oni alfrontas historion okulfrapan kaj nenie viditan. Tio estas la forta kaj intima kunligiteco inter partio kaj Esperanto. En neniu alia lando nia lingvo atingis tian elstaran pozicion kiel en tiu lando. Nenie la influo de Esperanto estas tiel rimarkebla kaj ĝi kreskas de jaro al jaro. Travojaĝinte tiun ŝtaton en 1984, mi ĉie kaj ĉiam povas konfirmi tiun ĉi konstaton. Vere unika kaj modela ekzemplo de longa kaj streĉa laboro. Bulgario estas la sola lando en la socialisma tendaro, kie nia lingvo plene integriĝis en popolo kaj partio, konsistigante koheran unuecon inter ambaŭ. Kiel povas estiĝi tia fenomeno? Nun, la ŝlosilo liveras al ni la en Sofio aperinta, supre menciita libreto. El ĝi ni lernas kial nia lingvo fariĝis tia potenca socia faktoro. Pri tiuj sukcesoj aliaj nur povas revii kaj aŭguri — sed en Bulgario Esperanto fariĝis lingvo de l'paco kaj socialismo, simbiozo de l'Zamenhofaj konceptoj kun tiuj de l'reala socialismo.

Jam tre frue la laboristaj esperantistoj ekkonis la valoron de Esperanto por la laborista movado, celanta forigi la ekspluatistan sistemon kaj konstrui mondon de libereco kaj demokratio, sen ekspluatado kaj milito. Jam la lastaj vortoj en la Komunista Manifesto de Marx kaj Engels determinis la taskon kaj celon de la laborista E-movado uzadi lingvon por konkretigi tiujn sloganojn. En multaj landoj komenciĝis la praktika uzado de Esperanto por tiuj celoj. Bulgario estis unu el la plej fruaj lokoj, kie naskiĝis kaj disvastiĝis la Internacia Lingvo. Al tio multe helpis la „Balkana Laboristo“, kiel pruvas jenaj difinitaj tekstpartoj: „Unu el tiaj movfortoj celinta uzi Esperanton kiel lingvon de la tut-

monda proletaro kaj ligi ĝin kun la klasbatalo, estas la internacia laborista movado. Esperanto estas la plej taŭga internacia lingvo por laboristoj, portantoj de nova kulturo, nova mondo, pro tio, ke unue ilia vojo al klerigo estas limigata de la maljusta sociordo, kiu monopoligis la sciencan por multo da feliĉuloj, kaj due, ke ili bezonas kiel neniu alia, interkonatiĝi kun kamaradoj el aliaj landoj, kunigi la klopodojn en batalo por justa sociordo. Esperanto por ĝi estas ilo — ne nur kleriga, sed ankaŭ batala, servanta al la laborista klaso por atingi de la finaj celoj de proletaj idealoj. Jam tre frue „Balkana Laboristo“ (BL) senmaskigis la rolon de SAT, kiu pro oportunistaj deflankigoj en la SAT-estraro fariĝis antisocialisma. Pro tio BL orientiĝis al la proleta „PEK-servo“, perfekta ilo por informado pri la klasbatalo tutmonda. Tre frue komencis flori la amikaj rilatoj inter sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj kaj BL multe kontribuis al tiu celo. Grandan meriton faris BL per eldono kaj disvastigo de Esperanta literaturo kun revolucia enhavo. Asen Grigorov, merita E-poeto, publikigis verskolekton „Ruĝa Aŭroro“, krome BL eldonis verkojn de Ĥristo Smirnenski, sed tre grava estis eldono de lerniloj kaj vortaroj. Post ĉesigo de BL, estis fondita bulgarlingva periodaĵo „Mejdunaroden Ezik“, (ME) faranta propagandon inter laboristoj. Ideo altnivela, en marksisma spirito, ĝi komencas disvastiĝi en Bulgario.

La eldono de BL dum preskaŭ tri jaroj havas grandan signifon por la laborista Esperanto-movado en Bulgario. La revuo ludas gravan rolon por la marksisma-leninisma klerigo de la esperantistoj kiel tuto. Ĝi helpas al ilia klaskonsciigo, al ilia proksimiĝo al la progresemaĵoj sociaj fortoj. Ĉe la lulilo de BL staris eminentaj esperantistoj kiel Ĥristo Gorov, N. Aleksiev kaj Asen Grigorov kun multaj aliaj kamaradoj. Tiu ĉi libreto estas valora kontribuo por la revolucia E-movado. La libreto estas havebla ĉe Bulgara E-Asocio, Sofio.

ERANO

(Recenzo publikigita en n-ro 3—4/1985 de „Internaciisto“, organo de KEK, Aŭstrio)

HIROŜIMA MIAMEMORE

La 6-an de aŭgusto 1945, je la 8-a kaj 15, la atombombo eksplodis super Hiroŝima. Mi (Tuyziô Kazuo, veterana verkanto de la ĵurnalo Asahi) tiam estis 1,8 km for de la eksploda centro.

Mi vidis sennombrajn homojn, kiuj sinsekve mortis en mizera stato, kun brulvundoj sur la tuta korpo, makulitaj de sango, portantaj ĉifonaĵojn.

El ili estis knaboj, studentoj, junulinoj kaj maljunuloj; patrinoj gardantaj sian bebon en la sino. Mortis ankaŭ ĉevaloj, hundoj. . .

Mi ne povas forgesi ilin: La knabo de la elementa lernejo, kiu kun fortondita hararo kuŝante sur pajla mato, alvokadis la patrinon, kaj baldaŭ fariĝis senmova. La knabino, kiu per la buŝo ne malfermebla pro ŝvelo malforte petis: „Donu akvon.“ La nuda virino, kies vizaĝo perdis la okulojn kaj la nazon platigite. La junulo, de kies korpo falis bruligita haŭto, kaj ruĝnigraj muskoloj senkovre sin prezentis. La maljunulo senforte sidanta sur ponto makulite de sango elfluanta el la kapo. . .

Ne havante rimedon por kuracado, oni devis lasi la homojn morti. Nenio estas pli kora ol tio. Eĉ se iomete brulvundiĝus pinto de fingro, mi plendus pri doloro. Kian turmenton ricevis ili pri sia tuta korpo bruligite ulcera!

Ili perdis domon pro fajrego, fuĝis el la flamoj konfuzite, kaj estis ĵetitaj en sensavan staton. Kun kia penso ili mortis aŭ ĉe rivero, aŭ en parko, aŭ sur korto, strato?

Cu ĉi tio estas Hiroŝima? — Nur unu atombombo ŝanĝis la belan urbon kun akvo kaj verdo, kiuj min karese kreskigis, en masakrejon. Estis tiel kruele, kvazaŭ la ĉielo kaj la tero interŝanĝis siajn lokojn.

Ciuj diras: „Estis infer!“ Kaj mi mem vidis „la lastan tagon de Tero“.

Kiam mi pripensas la esencon de modernaj armiloj kiel atombombo, mi vidas en ili „la vojon al katastrofo“. Ĉu ne iam la homaro pereos absolute, same kiel la homoj de Hiroŝima en tiu tago? Mi sentas senpaciencon kaj senhelpecon pri la stulteco de la homo.

Verdire nur mirakle mi ne perdis la vivon. Mi neniel havas la memfidon, denove postvivi, se super mi ankoraŭfoje eksplodos atombombo.

Tiam mi estis 19-jara duaklasano en „altlernejo“ laŭ la malnova edukistemo, sed mobilize laborigita kiel ŝoforo de ŝarĝaŭto.

Ĉar en la mateno de la tago, abrupte paneis la bremsa de mia aŭto, mi riparadis ĝin en fabriko kuŝante sub la ŝarĝaŭto. Tiam la

atombombo eksplodis. Tute hazarde mi evitis la rektan atakon.

Poŝte mi komprenis, ke fabriko troviĝis 1,8 kilometrojn for de la eksploda centro. La tereno, malpli ol 2 kilometrojn for de la centro, estis tre danĝera parto, kie plej multaj estis mortigitaj. La fera karoserio malnovtipa kaj ses radringoj de la ŝarĝaŭto gardis min kontraŭ la unua disŝutiĝo de la radioaktivo kaj kontraŭ la detruigo de la fabriko pro la eksploda forblovo.

Kvankam ĉirkaŭ mi troviĝis neesprimeble terura stato, strange, nenian vundon mi ricevis, portante nur kuristan ĉemizon kaj kuloton.

Mi havis tri fratojn pli aĝajn, kaj ili kunvokite estis en la armeo. En Hiroŝima mi vivis triope kun la gepatroj. Dum tri tagoj post la eksplodo mi tranoktis sur tero en sportejo de la Universitato Hiroŝima por Literaturo kaj Scienco, kaj ĉirkaŭvadis serĉante la gepatrojn senspure malaperintajn. Ĉar mi iris apud la eksploda centro, povis esti, ke mi ricevis iom da dua radioaktivo. Sed mi estas sana de tiam ĝis nun dum 37 jaroj, escepte de persista malvarmumo en la fino de la jaro. Nenian malsanon de mi spertitan mi mencias en enketfolio, kiam mi ricevas regulan ekzamenon medicinan.

Eble en 1960, laŭ mia memoro, pro mia profesia tasko mi iris al eksterlando, kaj tiam sentadis mian kapon peza dum kelkaj tagoj. Kaj mi ricevis detalan ekzamenon pri mia korpo. Rezulte nenion malbonan oni trovis, sed nur iom mankis leŭkocitoj. Mi estis malsanema jam de la infaneco, kaj certe ili mankas al mi denaske.

En la fundo de mia koro nestas miaj amikoj, instruistoj, najbaroj mortigitaj, kaj elementa kaj mezgrada lernejoj forbruligitaj. . . Eĉ nun mi sonĝas pri tiama Hiroŝima. Kaj pro tio ne malofte mi vekiĝas preskaŭ sufokite.

(La japanlingva originalo de tiu ĉi pensiga esearo pri Hiroŝima felietone aperis en la ĵurnalo Asahi de la 2-a de julio 1982 ĝis la 30-a de septembro samjare. Verkis ĝin s-ro TYUZYU Kazuo, Veterana Verkanto de Asahi. Ni elektis preskaŭ duonon el ĝiaj ĉapitroj por esperantigo fare de s-ro HAYASI Ken.)

SOCIETO „NIKOLA SOPOV“ AKTIVAS

La sofia esperantista societo „Nikola Sopov“ faris vastan organizon laboron por digne renkonti la 41-an Kongreson de BEA. Unu el ĝiaj plej gravaj taskoj estis la eltrovo de novaj kaj malnovaj geesperantistoj en nia regiono. Post streĉa laboro ni sukcesis plimulti la membraron de la societo per pliaj 42 personoj.

Dank' al la zorgoj de la societanoj nun funkcias ok E-kursoj. Sep el ili estas en lernejoj. La novaj entuziasmuloj membras en lernejaj kluboj „Juna Esperantisto“. La civitana kurso — bone vizitata kaj sukcesa — estas por perfektigo de la lingvo.

Membroj de la societo, kune kun la estraro de leĝejo „Fajrero“, organizis vesperon de la bulgara folkloro. Interese prelegis prof. Stojan Guĝev. La programon partoprenis Miĥail Ĉobanov, kantgrupoj el la Esperanto-Horo kaj el vilaĝo Botunec.

Kunlabore kun la soci-politikaj organizaĵoj la esperantistoj okazigis kunvenojn dediĉitajn al la Tago de la Venko — 9-a de majo, kaj al la politikaj malliberuloj dum la lasta mondmilito. Impresplenaj por la societanoj restos la du aŭtomarŝoj ĝis Kovaĉevci — la naskiĝloko de Georgi Dimitrov kaj ĝis Plovdiv.

Ni organizis viziton al la monumento de Diĉo Petrov, heroe pereinta apud vilaĝo Batulio en batalo kontraŭ la faŝistoj por la libero de nia popolo. Tiun ekskurson partoprenis ankaŭ 20 gelernantoj, kiuj lernas Esperanton, ĉe-kape kun sia instruistino Jordanka Sâbeva.

Krome, ni kolektis grandan kvanton da metalaj kaj paperaĵaj restaĵoj je sumo de pli ol 400 levoĵ.

LJUBEN GROZDANOV

Sofio. Fine de marto 1985, 21 esperantistoj — membroj de nia E-societo „D-ro Stojan Vasiliev“, ekskursis al urbo Kjustendil kaj vilaĝo Jilinci. Tie ni vizitis la muzeon de D. Kaljaŝki — fama esperantisto-partizano, mortigita de la faŝistoj.

De Kjustendil nia grupo, kune kun la domastroj el E-societo „Flamo“, direktiĝis per aŭtobuso al Jilinci. En la centro de la vilaĝo ni metis florkronon ĉe la monumento de D. Kaljaŝki. Poste ni vizitis la muzeon, kie la prezidanto de la kjustendila societo G. Kaljaŝki prelegis pri la vivo kaj batalo de D. Kaljaŝki. Ni vizitis ankaŭ la lokon, kie la heroo estis mortigita kaj metis tie freŝajn florojn.

I. RADKOVA

Sumen. Al la Tagoj de Bulgara-Soveta Amikeco en Sumen-distrikto (15.04—15.05) kaj al la 40-datreveno de la glora venko super faŝismo kaj japana militarismo estis dediĉita la solena kunveno de E-societo „Vekiĝo“ — Sumen.

En sia emociplena parolado la prezidanto Cvjatko Stojanov substrekis, ke por la venko super la kruela hitlera faŝismo plej grave kontribuis Sovet-Unio — ĝiaj heroaj popolo kaj armeo.

En la Patrolanda Milito partoprenis 8 esperantistoj el Sumen. Oni neniam forgesos la veteranon Ivan Jankov — partopreninton en la du mondmilitoj, subkolonelon Dimitar Penĉev, kiu dum la heroo batalo apud rivero Drava estis grave vundita kaj, dum lia restado en sofiaj malsanulejoj, ĝuis varmajn zorgojn fare de multaj sofiaj geesperantistoj.

Nun membroj de „Vekiĝo“ havas multajn geamikojn en Sovetunio. Ili regule korespondas, ĝuas reciprokajn gastadojn.

Grupo da junpioniroj plenumis esperantlingve salutprogramon honore al la vivaj esperantistoj-militveteranoj d-ro Jelez Tonev, Georgi Marov, Radenko Iliev kaj Dimitar Zagorski.

Cvjatko TODOROV

E-JUNULARA BALO

Ĉi-printempe en la Centra Studenta Domo okazis printempa balo, organizita de la Domo kaj de la Sofia Esperanta Centro „M. Gorkij“.

La gvidanto Bojdar Aleksiev varme salutis ĉiujn ĉeestantajn amikojn de Esperanto. Li informis koncize pri la kreinto de la Internacia Lingvo d-ro L. L. Zamenhof kaj pri la agado de BEA. Unu el la plej aktivaj sekcioj de BEA estas la junulara sekcio, — diris B. Aleksiev. Li substrekis ankaŭ, ke Esperanto posedas ĉiujn necesajn kvalitojn, por esti la internacia lingvo de la nuntempa mondo.

La literaturan-muzikan programon partoprenis konataj kaj ŝatataj de la junularo kantistoj kaj kantgrupoj, la Studenta Pantomima Teatro. Membroj de la Klubo de Studentoj-Verkistoj „D. Debeljanov“ legis siajn verkojn.

La junulara balo transformiĝis en manifestacion de la amikeco inter studentoj kaj E-junularo.

Vera RAJKOVSKA

Ĉu vi jam abonis revuon „Bulgara Esperantisto“?

FESTO EN STRATO „D-RO ZAMENHOF“

Kiu estas d-ro Zamenhof? Kial ilia strato portas lian nomon? Kio estas Esperanto?

Gis nun la plimulto da loĝantoj de strato „D-ro Zamenhof“ en loĝejkomplekso „Suhata Reka“ de la ĉefurba subdistrikto „Vasil Levski“ ne kapablis respondi al tiuj ĉi demandoj, ne sciis, ke en la mondo estas 459 aliaj stratoj, kiuj portas la nomon de l'genia kreinto de la Internacia Lingvo. En Bulgario la nombro de stratoj kaj placoj, portantaj la nomojn „Esperanto“ kaj „D-ro Zamenhof“ jam estas 38.

La granda kaj sincera amo al Esperanto kaj al ĝia aŭtoro, la estimo al la samloĝantoj kaj najbaroj estis la kaŭzo, pro kiu la aktivuloj de E-societo „Nikola Botuŝev“ organizis la unuan feston en sia kvartalo.

La societa prezidanto d-ro Balĉev rakontis pri la vivo kaj agado de d-ro Zamenhof. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la centra kaj urba estraroj de BEA, membroj de la Patrolanda Fronto kaj de la kvartala partia organizajo.

Eĉ multjaraj geesperantistoj, kiuj partoprenis la solenaĵon, havis eblecon ekscii utilajn detalojn pri la E-movado en nia lando, en la mondo.

Por la bona atmosfero ege kontribuis la riĉa kaj majstre prezentita programo kun partopreno de la Sofia E-horo kaj la geaktoroj-esperantistoj Luna Davidova, Angelina Sotirova, Miĥail Zdravev.

La unua Esperanta festo de la loĝantoj de strato „D-ro Zamenhof“, kvankam modesta, donas al ni la firman esperon, ke sekvos multaj similaj vesperoj, ke ĉiam pli multaj bulgarioj ekamos Esperanton.

S. ĈENKOVA

ANTAUKONGRESA RENKONTIGO

La 15—16-an de junio j. k. en v. Borima, distrikto de Loveĉ, okazis renkontigo de esperantistoj el Loveĉ-distrikto okaze de la 41-a nacia E-kongreso.

En sia raporto la prezidanto de la Distrikta Estraro Coĉo Kolarov substrekis la atingitajn sukcesojn en lernado kaj disvastigado de Esperanto en la distrikto.

La renkontigon partoprenis reprezentantoj de la E-societoj el Loveĉ, Trojan, Lukovit, Letnica, Teteven, Borima, Stojanovo kaj gasoj el urbo Razgrad.

Estis akceptita laborplano por aktivigo de la esperantistoj el la distrikto.

Dimităr IVANOV

REMEMORO PRI SIMEON ĈIRPANLIEV

La 6-an de februaro j. k. en la homplena salono de legejo „Svoboda“ — Kolarov-subdistrikto, oni solene cebebris la 80-jariĝon de la amata instruisto, talenta pentristo, verkisto, aktoro kaj fervora esperantisto Simeon Ĉirpanliev, forpasinta antaŭ naŭ jaroj. Simeon Ĉirpanliev naskiĝis en la fama vilaĝo Sipka, studis pedagogian lernejon, prenis sur siajn ŝultrojn la pezan, sed noblan ŝarĝon de popola instruisto, kiun li portis tutan vivon. Estinte en diversaj regionoj de nia patrolando, li ne nur instruis kaj edukis la infanojn, sed ankaŭ zorgis pri la klerigo de iliaj gepatroj kaj pli aĝaj gefratoj. En la legejoj li prelegis pri diversaj temoj, organizis teatrajn trupojn, mem verkis teatraĵojn kaj ludis sur la scenejo. Kaj ĉie, kie li loĝis kaj laboris, li pentris la belaĵojn de Bulgario.

Multaj el la ĉeestintoj dum la memor-solenaĵo konis la meritan veteranon kaj gardas en siaj koroj bonegajn rememorojn pri li. Multajn jarojn Ĉirpanliev estis instruisto en la tiama apud sofia vilaĝo Vrâbnica — nun kvartalo de Kolarov-subdistrikto. Li restis sur sia posteno eĉ en la terura tempo de la bombardoj dum 1944, savis la vivon de siaj troviĝantaj ĉe li ĝelernantoj. Post la socialisma revolucio li fervore instruis en kursejoj por klerigo de analfabetoj.

Profunde konvinkita, ke la internacia lingvo Esperanto estas bonega rimedo por amikeco kaj interkompreniĝo, Ĉirpanliev instruis ĝin. Li donis sian kontribuon ankaŭ al la E-literaturo. Li membris en la Sofia literatura E-rondo kaj iuj el liaj verkaĵoj estis presitaj en la organo de BEA „Bulgara Esperantisto“.

Stefan SOKOLOV

ESPERIGA KOMENCO

En Strajica, urbo en distrikto Veliko Târnovo, kun riĉa antifaŝisma biografio dank' al la klopodoj de la lerneja inspektoro-esperantisto Ĥristo Conev pli ol 30 ĝeinstruistoj el la loka gimnazio komencis lerni la Internacian Lingvon. Al kiuj mankas libera tempo por viziti la kurson, aĉetis lernolibron por memstare lerni hejme.

Baldaŭ estis fondita ankaŭ E-societo. Ĉiuj ĝiaj membroj estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“.

La gvidantaro de la nova societo Mila Todorova (prezidentino), Stefka Negencova (sekretariino) kaj Todor Kirilov (kasisto) intencas fari ĉion eblan por altiri adeptojn de la Internacia Lingvo.

ĤRISTO MANOLOV

La jubilean Dekan Printempan Amikan Renkontigon Esperantistan (PARE) ĉi-jare partoprenis pli ol 220 gastoj el diversaj loĝlokoj de la lando. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el la ĝemelaj urboj de Ruse: Potsdam (GDR) kaj Solnok (Hungario).

PARE okazis en la nova Domo de la Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo kaj estis dediĉita al la 40-jara datreveno de la granda venko super hitler-faŝismo.

Enkadre de la aranĝo okazis junulara konferenco kaj V-a jubilea kooperativa landa renkontiĝo. El Sofio gastis D. Mutuŝev — ĝenerala direktoro de la Ĉefdirekcio pri Ekonomia Agado, la prezidantino de BEK inĝ. Maria Paskova, Nikola Mladenov el la sofia urba estraro de BEA.

Post la kooperativa renkontiĝo la partoprenantoj metis florkronon ĉe la monumento de la sovetaj soldatoj.

Ivan Slavov prelegis pri la heroaĵo de la sovetaj popolo, oferinta 20 milionojn da homaj vivoj.

La arta literatura programo estis zorge preparita kaj bonege prezentita.

Por la sekvonta tago estis proponita programo sub la gvidado de s-ino Belĉeva — vizito de panteono kaj muzeoj. Por la eksterlandaj gastinoj oni aranĝis ekskurson al urbo Pleven por vizito de la Panoramo.

BORIS KAVALĜIEV

FRUKTA VESPERO

La tradicia Frukta Vespero en Kjustendil okazis la 22—23-an de junio j. k. La partoprenantojn el pli ol 10 urboj denove plezurigis la fama kantgrupo „Verdaj Steletoj“. Poste oni aŭskultis la prelegon de k-do K. Vălev „Esperanto kaj paco“.

La duan tagon oni vizitis la muzeon kaj monumenton de la mondfama pentristo Vl. Dimitrov — la Majstro, en lia naskiĝloko — la ĉarma vilaĝo Siŝkovci.

La laboremaj vilaĝanoj el Siŝkovci, Si-poĉano kaj Konjavo kolektis abundan ĉerizrikolton. Dimităr Zlogoŝki el v. Konjavo rakontis pri la diversaj ĉerizspecoj en la kooperativa ĝardeno. La esperantistoj havis eblecon gustumi la plej bongustajn ĉerizojn en nia lando. La fruktojn de niaj ĉerizĝardenoj oni eksportas en Belgion, FRG, Nederlandon, USSR kaj aliajn eŭropajn landojn.

Mirinde bela estas la kamparo de Kjustendil — la fruktĝardeno de nia lando — ja ne hazarde ĝi estas ŝatata temo en la verkoj de la Majstro.

ĈEESTINTO

En Kubo la E-movado renaskiĝas depost la fondo de Kuba Esperanto-Asocio (KEA); kaj Camagüey (Kamaguejo esperantigite) estas la provinco kun pli da KEA-anoj ekster la ĉefurbo. Nun mi funkcias kiel prezidanto de Provinca Estraro de KEA por Kamaguejo, kaj por via revuo jen interesaj novaĵoj.

La Unua Kongreso de KEA okazos en Havano en julio 1987. Memore al tiu evento kaj al Jubileo de Esperanto estos emisiita en Kubo serio da poŝtmarkoj fare de Ministerio por Komuniko kaj ankaŭ monero kaj medalo fare de Nacia Banko de Kubo.

Plia sukceso de KEA estas ke du el ĝiaj junaj anoj ĉeestos la XII Tutmondan Festivalon de Junularo kaj Studentoj en Moskvo. Ili ambaŭ estos reprezentantoj de KEA: ŝi nomigas Maritza Gutiérrez, el Havano; kaj li estas Emir Pedraza Pérez, el Kamaguejo.

Nun Esperanto troviĝas en la listo de la lingvoj de Fremdlingva Eldonejo „José Martí“ en Havano. Pasintjare estis presita „La historio absolvos min“ de Fidel Castro, esperantigita de kolektivo de tradukistoj de KEA.

Raúl Juárez SEDEÑO

DONACO EL BULGARIO

Nun en Bulgario aktivas unu el la plej fortaj en la mondo E-Asocioj. Ĝi disponas pri propra presejo kaj pri reto da librovendejoj.

Eksciinte, ke en Smolensk estas fondita Esperanto-Klubo, laŭ iniciato de la bulgara E-veterano Nikola Aleksiev, BEA sendis al la esperantistoj en Smolensk multajn E-librojn-eldonitajn dum la periodo 1983—1985 — poemaroj kaj beletraĵ verkoj de bulgaraj poetoj kaj verkistoj.

P. GLOTOV
(El ĵurnalo „Raboĉij Putj“)
USSR

SEMINARIO PRI METODIKO

En la jam konata seminariejo de GDREA Bad Saarow (ĉe Berlino) de 9-a ĝis 14-a de decembro 1985 denove okazos internacia fakseminario. 40 fakuloj traktos la temon „Problemoj de metodiko de Esperanto-instruado al plenkreskuloj“. La partoprenkotizo estas 100 markoj, pageblaj surloke. Civitanoj el socialismaj landoj pagas en GDR-mono, civitanoj el ne socialismaj landoj — en dolaroj aŭ okcidentaj markoj.

Interesiĝantoj skribu al: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, DDR-1080 Berlino, Charlottenstr. 60.



DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILIO

Johanò Müller de Souza (54-jara) — CEP 22 240, RIO DE JANEIRO, LARANJEIRAS, Rua das Laranjeiras, 206/701 — dez. kor. precipe kun virinoj pri popolkutimoj, geografio, astronomio, matematiko, literaturo, muziko, fremdaj lingvoj.

BULGARIO

S-rino Lada Milkova (33-jara, fotistino) — Sofio — 1000, str. „Han Asparuh“, 61 — dez. kor. tutmonde pri fotado, arto, infanproblemoj kaj kuirarto.

FRANCIO

Mikaelo Legris — 65 330 Galan — kolektas diversajn Esperantaĵojn: PK, insignojn, stampojn, ktp.

Dominique Carré (26-jara) — 59100 La Madeleine, 3, rue Aristide Brand — dez. kor. pri muziko, pachtalo, vojaĝoj.

HUNGARIO

Császár Győző — H-7627, Pecs, Korház ter 7 — kolektas PK de urboj.

Antal Gál (24-jara junulo) — 9023 Győr, Meszaros Lőrinc u. 10 — dez. kor. kun bulgaraj gejunuloj pri fotografado, legado, Esperanto-movado.

RUMANIO

Nagy Akos (14-jara lernanto) — 4193 Ulies, str. Principala 50, Jud. Harghita — dez. kor. kun geknaĵoj; kolektas BK.

SOVET-UNIO

Smatnik Andreo Enrikovič (20-jara, studento de arkitekturo) — 634041 Tomsk, a/k 261 E-klubo — dez. kor. pri arto, muziko, arkitekturo.

Stefano Ivanovič (28-jara) — 295 400 g. Mukačevo obl. Zakarpatskaja, str. Gvardejskaja 117 — kun-ĉl pri ĉt.

Marina Merkulova (20-jara studentino) — 357 513 Pjatigorsk, str. Mira dom 39, kv. 3 — kun. ĉl pri diversaj temoj.

Aleksej Fjodorovič Zikov (47-jara inĝeniero-konstruisto de vojoj) — 473 000 Celinograd, str. Mira 55, kv. 11 — kun ĉl pri filozofio kaj literaturo.

VJETNAMIO

Tran-Chan Tri (26-jara bibliotekisto) — Nhatrang, 24 Ly Tu Trone — kun ĉl pri kino, muziko, Esperanto; kolektas PM.

ENHAVO

D. ĤAĜIEV La „bulgara spuro“ — ĉu politika ĉantaĝo?	11, 6
K. VALEV. Nin atendas la nova lernoĵaro	1, 2
Inĝ. Iv. PACOV. Pri la E-instruado en Sofio	3
M. JANKOVA. Freŝaj fortoj por nia E-movado	3, 4
M. B. Unua plenkursido de BEJ-estraro	4
L. KOLEVA. Antaŭkongresa virina konferenco	5
H. LEVI. Ĝojgaj rezultoj:	5
Liberon por Antonov!	6
R. BANCEVSKI. Emocia memorkunveno	7
St. SOKOLOV. Rememoro pri As. Grigorov	7
* * * Niaj E-veteranoj	8, 9
D. MUTUSEV. Turismo kaj Esperanto	10, 11
C. MURGIN. Turista kanto	11
ERANO. Ĉu nur historio?	12
* * * Hiroŝima miamemore	13
* * * Enlanda movado.	14, 15, 16
* * * Deziras korespondi	III
* * * Distroj	IV

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno, sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj. La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn). La Redakcio akceptas la originan (unuane)ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondantojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuŝ post la arango. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aĉeros en „BE“ post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

NI LA REDAKCIO KONDOLENCAS

Ne plu estas en niaj vicoj STEFAN GANEV POPOV. Li forpasis la 24-an de aprilo 1985 en Ruse, en sia 82-jara aĝo. Ĉiuj, kiuj konis Stefan Popov, memoras lin kiel vere popolan advokaton kaj fidelan esperantiston. Dum 12 jaroj li estis kasisto de societo „Libero“ kaj de DE de BEA en Ruse.

Ĝis siaj lastaj tagoj Stefan Popov gvidis kursojn de Esperanto, instruis al siaj kursanoj kiel korekte uzi nian mirindan lingvon. Li neniam ŝparis siajn fortojn por disvastigo de la Internacia Lingvo. Li estis talenta tradukisto kaj kelkfoje gajnis premiojn en konkursoj de revuo „Bulgara Esperantisto“.

La esperantistoj en Ruse amis kaj estimis lin pro liaj modesteco, humaneco, pro liaj grandaj meritoj, por prospero de la E-movado en Ruse.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vidaĵo al montopinto Vihren en Pirin-montaro.

Foto: Petăr Bojkov

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAČEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJČINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordono „Cirilo kaj Metodio“ — I grado Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distro



el la praktiko

— Kial la pentristoj ĉiam subskribas sin sur la malsupra parto de la bildo? — demandas la infano.

— Por ke ĉiuj sciu kiu estas la supra parto — respondas la patro.

La filo alportas hejmen recepton por maldikiĝo. Laŭ la preskribo li devas preni po 2 pilolojn, 2 fojojn tage, 2 horojn antaŭ manĝado.

— Ankaŭ tiu kuracilo fiaskos, ekspiras la patrino — neniam li pasigas 2 horojn sen manĝi.

Iu sinjorino ne aprobas la knabinon, kiun ŝia filo elektis por edzino. Amiko konsilas la junulon:

— Vi devas serĉi edzinon similan al via patrino.

Post sep monatoj la amikoj renkontiĝas.

— Mi trovis junulinon, kiu aspektas samkiel mia patrino laŭ staturo, maniero kaj sinteno.

— Miajn gratulojn!

— Sed nun mia patro kontraŭstaras.

En la flughaveno kvar knabinoj atendas sian amikininon, kiu alvenos per aviadilo. Ĉiunminute ili konsultas siajn brakhorloĝojn. Fine iu el ili diras: „Ni havas ankoraŭ sufiĉe da tempo. Konante Amnan bone, mi scias ke la aviadilo, per kiu ŝi alvenos, malfruiĝos almenaŭ unu horon.

La infano ekzercas sin ludi violonon, dum lia patro legas sian gazeton. Krom tio la hundo bojante akompanas la muzikon. La patro ne eltenas kaj diras kolerigite: „Se vi ne povas ludi pli bone, almenaŭ ne disigu de la hundo!“

KVARLINGVA PETO

Angle: „Vi estas petata ne pluki florojn.“

Germane: „Estas malpermesate pluki florojn.“

France: „Kiu ŝatas la naturon estimas ĝiajn florojn.“

Bulgare: „Ne pluku la florojn, ili estas viaj.“

Kompilis kaj tradukis el la hispana:
V. BALEVA

Kiam vi telefonas Esperante kaj devas li terumi iun vorton, indiku la literojn per ilia nomoj en la ĉi-suba tabelo. Tio konsiderinde faciligos la komprenon.

Asfalto	Gumo	Kilogramo	Salato
Barbaro	Girafo	Legendo	Silingo
Centimetro	Hotelo	Maŝino	Triumfo
Ĉefo	Haoso	Naturo	Universo
Doktoro	Insekto	Omnibuso	Universo-hoko
Elemento	Jubileo	Papero	Vulkano
Fabriko	Jurnalo	Rekordo	Zinko

Diru en telefono ekz:

„Por viziti min, bonvolu uzi tramon kun surskribo „Thekla“. Mi literumas: „Triumfo hotelo elemento kilogramo legendo asfalto“.

Se en la vorto enestas literoj, kiuj ne apartenas al la Esperanta alfabeto, nomu ilin jene:
q = kuo w = germana vo x = ikso
y = ipsilono

Ne diru por w „duobla vo“, ĉar tio povus esti ankaŭ vil. Literojn kun aldonaj signoj nomu jene:

á = a streko-supren

à = a tildo

ă = a cirkumfleko

a = a tremao

ā = a streko-kuŝanta

c = co pinthoko

ç = co subhoko (cedilo)


ĉ = co pinthoko

Ø = o trastro

ktp.

â = a streko-falanta

ANGULENIGMO



— Ne enestas kaŝfrazoj, vertikalaj kolonoj egalas al la horizontalaj.

A — Vasta vidaĵo.

B — Sekurigi.

C — Regno inter Hindujo kaj Tibeto.

D — Fariĝi.

E — Turnante movi ion.

F — Grupo.

G — Persona pronomo.

G — Kemia simbolo de oksigeno.